# STARTO

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO 1973 2 (32)

## PŘEDSJEZDOVÉ ZAMYŠLENÍ

Drahomír KOČVARA, místopředseda ČES

Sjezd, nejvyšší orgán našeho svazu, je přede dveřmi. Období od zakládajícího brněnského sjezdu bylo velmi rušné. Navazovali jsme na pokrokové tradice dělnických esperantistů, snažili jsme se dát esperanto do služeb naší socialistické vlasti. A to je správná cesta, která vede k našemu cíli, oficiálnímu uznání esperanta. Kroužky v Plzni, Ostravě a Liberci seznámily veřejnost pomocí výstavek s prací esperantistů na poli propagace naší vlasti, našich výrobků, naší cesty k socialismu.

Byly navázány úzké přátelské styky s esperantskými organizacemi v socialistických zemích. Vyměňujeme si zkušenosti a navazujeme družbu. Projevily se kladné výsledky, například výměna učitelů s NDR a BLR v letním táboře v Lančově. Dále je to výměna esperantské literatury, vzájemné návštěvy na národních sjezdech apod.

Dobrá byla spolupráce se Svazem esperantistů SSR. Informujeme se vzájemně o svých úspěších a snažíme se jich docílit ve svých republikách. Tuto spolupráci je třeba nadále zlepšovat a rozšiřovat. To bude základem pro práci Čs. esperantské federace.

Příprava na sjezd vyvrcholila školením našich funkcionářů v Měříně. Uspořádal je náš svaz ve spolupráci s ministerstvem kultury. Zúčastnili se jej zástupci kroužků, členové a kandidáti nového ÚV, členové přípravného výboru sjezdu a okresní důvěrníci MEM. To je v našem hnutí nové, a jistě to přinese své ovoce. Vedoucí sekce esperanta v Kulturním svazu NDR, Detlev Blanke, nás na školení seznámil s

## Rememore pri Februaro



La dramecaj eventoj en februaro 1948 enskribiĝis en mian memoron pro streĉiteco de la decidaj tagoj ekde la 20a de februaro /demisio de la ministroj de reakciaj partioj - nacionalsocialisma, popola kaj demokrata/ ĝis la 25a de februaro, sed ankaŭ pro optimismo de la laboristoj, kamparanoj kaj progresema inteligentularo spontanee subtenantaj la politikon de KPĈ kaj de ties ĉefo Klement Gottwald.

Partopreninte grandiozan manifestacion sur la Venceslao-placo, kunvokitan la 25.2. de la revoluciaj sindikatoj, mi atendis la aperon de kamarado Gottwald, kiu traktis tiam kun prezidento Beneš por

prací tamních esperantistů,která je pro nás v mnohém příkladná.

Větší péči než dosud musíme věnovat naší mládežnické sekci a šíření esperanta mezi mládeží. Umožňovat účast na mezinárodních esperantských pracovních brigádách. Zakládat esperantské kroužky při pionýrských domech, umožňovat mládeži účast na mezinárodních esperantských táborech,jimiž by mohla její c e l oroční činnost vyvrcholit. Podařilo se to ostravským pionýrům v loňském roce,kdy se jich šestnáct zúčastnilo pionýrského esperantského tábora v MLR. Další správný směr naší činnosti je v pořádání školení se Svazem socialistické mládeže, jak se to podařilo již dvakrát v Liberci. Je třeba mít stále na zřeteli, že v mládeži je budoucnost našeho hnutí.

Příkladem správného uplatnění esperanta je činnost mírové sekce (MEM)ČES. Pracovat s esperantem v boji za světový mír je velmi záslužné. Jsme právem hrdi na to, že zakladatelem světového mírového esperantského hnutí byl R.Burda z Plzně. On a jeho spolupracovníci burcovali pomocí esperanta svědomí lidí k boji za svět bez válek.

Mírová sekce našeho svazu vyhlásila předloni kampaň "Na pomoc bojujícím přátelům ve Vietnamu". Dnes se tato kampaň stala celonárodní akcí. Na vítězném západe vietnamského lidu má tak svou zásluhu i náš svaz a jeho nejdůležitější sekce, která prakticky ukázala naší veřejnosti angažovanou politickou práci esperantistů. Proto se mírová sekce stává páteří našeho esperantského hnutí.

Sjezd bude pro naše esperantské hnutí důležitým mezníkem. Zvolením ústředního výboru z kandidátů,které kroužky navrhly, vytvoříme předpoklad naší další činnosti,jíž plně podpoříme realizaci usnesení XIV.sjezdu KSČ.To se musí v našem sjezdovém jednání projevit.

# Ni ĝojas kun vi...

Okaze de la subskribo de la packontrakto pri Vjetnamio sendis al VPEA sinceran fratan salutleteron la estraro de la Porpaca sekcio de ĈEA.Oni skribas i.a:

Ĉe tiu ĉi plezuriga okazo ni volas vin certigi, karaj kamaradoj,ke same kiel ĝis nun dum via prava batalo por la libereco kaj sendependeco,ni ankaŭ venonte subtenados vin laŭ niaj eblecoj kaj fortoj...

La leteron subskribis T.Balda,la sekcia prezidanto kaj M.Josková,sekretariino.

akceptigi al li la demision kaj aprobigi proponon pri la nova registaro. Kiam Gottwald anoncis,ke la prezidento konsentas, sur la tuta placo eksplodis entuziasma jubilo. Per tondra ĥoralo de 250 mil voĉoj eksonis la Internacio,fermante tiel la manifestacion. Ĝi estis profunda kaj ĝoja impreso,kiun oni rememoras dum la tuta vivo.

Vespere ni havis regulan kunvenon de Esperantista Klubo en la kafejo Louvre. Ni spektis de tie solenan marŝon de la popola milico, kiu manifestaciis sian volon protekti la akiraĵojn de la popoldemokratia ŝtato.

Tiam ankoraŭ multaj niaj anoj estis embarasitaj kaj timis pluan evoluon, ne konsciante,ke temas pri historia turniĝo en la vivo de niaj popoloj - en la konstruado de la socialisma socio kaj favore al ĉiuj laboruloj.En la klubo konstituiĝis poste Ago-komitato de Nacia Fronto kaj la esperantistoj stariĝis ĉeflanke de la granda plimulto de la nacio. Kiel principaj anoj de la paco ni fiere aprezis precipe la fakton, ke tia gravsignifa paŝo okazis konforme al la konstituciaj leĝoj kaj sen iu ajn ofero de homa vivo.

En nia agado kaj kontaktoj kun eksterlando dum sekvantaj jaroj - kiam la tutmondaj reakciuloj eluzis ĉiun eblecon por false prezentadi la februarajn eventojn - ni havis multe da eblecoj kiel defendi la politikon de la renoviĝintaj Nacia Fronto kaj registaro. La plimulto de niaj membroj tion praktikis kiel honoran taskon kaj oferemе partoprenis ĉe la dissendado de "Esperanto-Servo" kaj de diversaj dokumentoj eksterlanden ankaŭ en sia ampleksa persona korespondado.

Pro tio ankaŭ nunjare okaze de tiu ĉi grava jubileo la ĉeĥoslovakaj esperantistoj, fidelaj al la progresema tradicio de nia movado, povis digne partopreni la solenaĵojn de la Venka Februaro. **F.Sviták**

---

SALUTOJN OKAZE DE LA INTERNACIA VIRINA TAGO sendis al ĈEA-membrinoj nome de BEA k-dino V.Petrova. Salutleteron al la sama adreso sendis ankaŭ Esperantista Klubo en Leningrado.

# INVITO AL OSTRAVA


La nordmoravia metropolo invitas sincere kaj kore ĉiujn geesperantistojn partopreni la II-an Kongreson de Ĉeĥa Esperanto - Asocio dum Pasko 1973.

Pri Ostrava oni povis multe aŭdi kaj legi en Ĉeĥoslovakio dum la lastaj jaroj... Ĝi estas nomata "la ŝtala koro de la respubliko", ĉar en ĝi situas du metalurgiaj kolosoj, la ferfabrikoj en Vítkovice kaj la metalurgia fabriko "Nová huť" en Kunčice ; ili ambaŭ portas la nomon de la unua laborista prezidento de Ĉeĥoslovakio, Klement Gottwald, kiu dum siaj junaj jaroj laboris en Ostrava kiel komunista redaktoro. Laŭ nombro de siaj loĝantoj Ostrava estas la tria urbo en Ĉeĥa Socialisma Respubliko, antaŭas ĝin nur Praha kaj Brno.


En la j.1880 Moravská Ostrava, la kerno de la venonta grandurbo, havis sole 41 mil loĝantojn, en 1900 jam 123 mil. Nun, sur la tuta urba teritorio la loĝantaro iĝis pli ol duobla. La impetan disvolvon kaŭzis la ĉiam kreskanta ekspluatado de la subtera riĉaĵo - la nigra karbo, kaj disvastigado de la metalurgiaj uzinoj. Tiuj en Vítkovice estis fonditaj jam en 1828, la "Nova metalurgia uzino" en Kunčice dum la socialisma epoko en nia lando. Pli ol 30 karboŝaktoj en Ostrava kaj en ĝia ĉirkaŭaĵo bezonis ĉiam pli multajn laborulojn, kiuj venadis ankaŭ el la proksimaj pola kaj germana teritorioj, kio forte influis ankaŭ la lokan dialekton.

Laŭ popola tradicio, la karbon trovis forĝisto Keltička. Hazarda trovinto de la karbo estis muelisto Jan Augustin el Klimkovice , sed la ekspluatado de la karbo komenciĝis nur kiam minmajstro Johano Jakobo Lutz malkovris karbotavolon sur monteto Jaklovec en Slezská Ostrava la 9an de junio 1767. Tamen jam tridek mil jarojn antaŭe, sur la monteto Landek, la mamutĉasantoj uzadis karbon por siaj bivakfajroj. Ili ankaŭ skulptis virinajn korpojn (venusojn) el hematito. Kaj ducent mil jarojn pli frue sur la teritorio de Ostrava vivis - aŭ almenaŭ ĝin vizitis - prahomo, kiu postlasis ĉi tie sian primitivan armilon, pugnan kojnon faritan el fajroŝtono.

La urbo Moravská Ostrava estis fondita en 1267. Tiam apud rivero Ostravice, ĉe la enfluo de la rivereto Lucina, staris kastelo, de kiu restis ruinoj ĝis hodiaŭ. La nuntempa vivo de la urbo estas viglega kaj en senco labora kaj en senco kultura. Eble duono da loĝantoj vivas jam en grandaj modernaj domoj, ĉefe en Poruba kaj Zábřeh kaj dise en aliaj kvartaloj. La silueton de la urbo karakterizas ŝaktoturoj, altaj fornegoj, gasrezervujoj kaj multegaj fumtubegoj. Tipa estas la turo de la nova urbodomo (vd.foton) kaj modernaj altaj turdomoj, kiuj en la malnova centro unuope superas ĉiujn aliajn domojn.



En Ostrava ekzistas tri teatroj, kiuj portas nomojn de la eminentuloj de la ĉeĥa kulturo : Zdeněk Nejedlý, Petr Bezruč kaj reĝisoro Jiří Myron. Ankaŭ muzikteatro riĉigas la kulturan vivon de la civitanoj kune kun la Ŝtata filharmonio. En la Domo de arto estas aranĝataj daŭraj ekspozicioj. Muzeo establita en konstruaĵo de la iama urbodomo estas historia vidindaĵo simile kiel la malnova preĝejo de Sta. Venceslao, proksime al ĝi. Dufoje vespere estas alirebla la astronomia observatorio. Ostrava havas ankaŭ Parkon de kulturo kaj ripozo kun granda ekspoziciejo, kie ĉiujare ankaŭ Esperanto estas uzata kiel propagandilo. Por infanoj ekzistas kelkaj pupteatroj kaj ankaŭ la bestĝardeno estas vizitinda.



Pri edukado de fakuloj zorgas diversaj mezgradaj lernejoj, alta lernejo por inĝenieroj minejaj kaj metalurgiaj, kaj pedagogia fakultato. Muzikaj talentoj povas studi en la konservatorio. Por sportistoj estas multaj sportejoj je dispono, ankaŭ tutjara naĝbaseno.

Inter multaj uzinaj kulturdomoj estas la plej gravaj tiu de la ferfabrikoj en Vítkovice en la urbocentro, ĉe kies filio funkcias Esperanto-klubo, kaj la dua estas tiu de ministoj en Poruba, ankaŭ kun esperantista rondeto. La unua est-

(daŭrigo sur la 8-a pg.)

# 2. SJEZD ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU (20.-23.4.1973)

OSTRAVA-PORUBA, DŮM KULTURY OSTRAVSKO-KARVINSKÝCH DOLŮ, KOPECKÉHO 675

P r o g r a m

20.dubna - pátek

19,00 - seznamovací večírek s hudbou,tancem a kulturním programem

21.dubna - sobota

8,00 - slavnostní zahájení sjezdu
volba pracovního předsednictva
schválení jednacího a volebního řádu
volba komisí (volební,mandátové a návrhové)
zdravice oficiálních hostů a zástupců institucí
zdravice zahraničních hostů
zpráva o činnosti svazu za uplynulé volební období (předseda J.Vítek)
zpráva o hospodaření svazu a činnosti sekretariátu (taj. P.Polnický)
zpráva ústřední revizní komise (J.Drlík)
zprávy o činnosti sekcí a komisí svazu

12,30 - oběd

13,30 - diskuse k předneseným zprávám
zpráva mandátové komise
seznámení s kandidáty ÚV a ÚRK
volby vrcholných orgánů svazu
pokračování diskuse
vyhlášení výsledků voleb

16,00 - zakončení prvního dne jednání

17,00 - zasedání nově zvoleného ÚV a ÚRK

18,00 - tisková konference

20,00 - vyhlášení vítězů literární soutěže Starta. Kulturní program

22.dubna - neděle

8,00 - konference mírové sekce ČES

9,30 - zahájení druhého dne jednání
představení nového ÚV a ÚRK
zpráva z prvního zasedání ÚV
programové prohlášení a jeho schválení
diskuse
zpráva návrhové komise a její schválení
pozdravné telegramy

12,30 - slavnostní zakončení sjezdu

13,30 - zasedání sekcí a komisí ČES (pro ostatní připravena prohlídka města)

23.dubna - pondělí

8,00 - celodenní výlet autobusem do Beskyd. Trasa : Ostrava-Fulnek-N.Jičín-Štramberk-Kopřivnice-Hodslavice-Místek-Ostrava. Při deštivém počasí návštěva muzea J.A.Komenského ve Fulneku,muzea klobouků v N.Jičíně,expozice automobilů v Kopřivnici a muzea F.Palackého v Hodslavicích.Při slunečním počasí pouze prohlídka muzea J.A.Komenského a expozice automobilů. Program bude v tomto případě rozšířen o návštěvu "Štramberské trúby" jeskyně Šipka a o výstup na Pustevny.

# Esperantistaj junuloj en Rynoltice

La IV-a seminario de junaj esperantistoj organizita de EK Liberec kunlabore kun la Distrikta komitato de Socialisma Junulara Ligo/DK SJL/ okazis en la kabano Černá Louže en Rynoltice /norda Bohemio/.

Partoprenis 42 gejunuloj, inter ili 4 eksterlandaj gastoj el GDR k Pollando.

Laborprogramo startis per prelegoj pri Junulara sekcio de ČEA /J.Bohun, V.Vítek/ kaj pri TEJO /J. Hamann, GDR/. Al la komencantaj esperantistoj prelegis pri IL kaj ties instruado A.Slanina /kiu lektoris ankaŭ modelan lecionon per la "rekta metodo"/, plue L.Špína k d-ro Hradil.

J.Hamann, aktivulo de TEJO, skizis la preparojn de la X-a junulara mondfestivalo en Berlino el vidpunkto de la junaj esperantistoj. L.Špína kaj funkciulo de DK SJL parolis pri la reciprokaj kontaktoj de esperantistaj kaj eksteresperantistaj organizaĵoj, speciale junularaj.

Sian solidarecon kun la vjetnama popolo esprimis la seminarianoj per financa kontribuo kaj forsendis leteron al la ambasado de VDR.

Distra kaj sporta programoj inkluzivis defendkapabligan vetkonkuron al la kastelo Lamberk, plue esp. kanzonojn, dancadon, rakontadon ktp. Per aplaŭdo oni aprezis la prelegon de A.Slanina pri sintenado de la juna homo antaŭ la publiko.

Al JS ČEA aliĝis ok novaj anoj.

La seminario resumis, ke necesas ligi pli intiman kunlaboron inter JS ČEA kaj SJL kaj esperantistaj junularaj organizaĵoj en la socialismaj landoj.

La V-a seminario okazos s a m l o k e la 4.-6.majo. Aliĝoj ĝis 15. 4.1973. Loĝeblecoj por 80 personoj.

Václav Vítek

## Lančov atendas vin

Kiel sciigas bulteno de la preparkomitato, SET Lančov okazos ankaŭ nunjare en du etapoj (15.7.-28.7.kaj 29.7.-11.8)

La kursoj estos laŭgrade dividitaj je A (por komencantoj), B(progresintoj), C (konversacia), D (porinstruista). La novaĵo estas E-kurso (por tradukantoj).

La tendar-kotizo, kiu inkluzivas kvin manĝojn potage, estas 450 Kčs. La sumo ne enkalkulas pagon (proks.60 - 80 Kčs) por la du ekskursoj.

La devo de ĉiu tendarano estas frekventi iun kurson, submeti sin al la fina ekzameno kaj observi la tendaran reguleron. Oni invitas ankaŭ eksterlandajn esperantistojn kun bona lingvo-nivelo. La aliĝiloj ĉe EK, pošt.schr. 72, 67 401 Třebíč.

Interesatoj pri laborbrigado (la 9-an de majo) estas ege bonvenaj !

## LA JUNULARO POR LA PACO, AMIKECO

Dekmiloj da gejunuloj el pli ol 120 landoj kunvenos ĉi-julie en Berlino por ĉeesti la X-an junularan mondfestivalon. Ankaŭ ĉi-jare okazos specialaj E.renkontiĝoj. La internacia festivala komitato tre serioze traktas la esperantistan programon kaj alte taksas la laboron de TEJO.

La preparkomitato por la Esp.festivala renkontiĝo atentigas, ke la sola ebleco por esperantistoj, kiel partopreni la aranĝon, estas fariĝi membro de la oficiala delegacio de la respektiva lando. Por atingi tion, oni povus kontakti per taŭga maniero la nacian preparkomitaton k prezenti al ĝi valoran laboron de TEJO kaj instigi ĝin, ke ankaŭ la esperantistoj eniru la nacian delegitaron.

ĜENERALA KONFERENCO DE TEKNIKA SEKCIO DE ČEA okazos dimanĉe la 22an de aprilo posttagmeze en Ostrava - Poruba. Morala devo de ĉiu membro estas ĉeesti kaj partopreni elekton de la nova 5-membra komitato kaj esprimi sian opinion pri la laborplano de TS por 1973-76, nuntempe diskutata inter la komitatanoj.

---

STARTO RECENZOS ĈIUN PUBLIKAĴON, SE LA ELDONISTO SENDOS ĜIN AL LA REDAKCIO !

# Rondeta vivo

B R N O - Omaĝe al la jubileaj februaraj tagoj la ĉi tiea EK aranĝis vesperon de proletaj poetoj en Esperanto. Eksonis la poemoj "Ruĝa standardo" de B.Czerwinski, "Ostrava" de P.Bezruč, "Nova gento" de H.Hess, "Ni estas" de E.Michalski,"Balado pri la hejtistaj okuloj" de J. Wolker (trad.J.Kořínek) kaj "Februaro" de Sakai (trad.Saburo Ito). Preparis Z. Hršel, deklamis M.Lorková,M.Malovec kaj A. Staněk.

H R A D E C K R Á L O V É - La 500an jubileon de Nikolao Kopernik oni rememoros per la ekspozicio inaŭgurita la 25.3. en la Kulturdomo de ROH. En ĝia kadro estos instalita kolekto de esp.poŝtmarkoj.

J A B L O N E C n.N. - Internacia trilanda porpaca renkontiĝo okazis fine de novembro en la apudlima urbeto Seifhennersdorf,GDR. Kunvenis tie malnovaj konatoj, sed ankaŭ multaj novaj esperantistoj el Zittau, Dresdeno,Meissen,Lejpcigo, Berlino, Pirna,Jelenia Góra,Katowice,Jablonec,Liberec,Ml.Boleslav,Ústí n.L. kaj Praha. La proksima "limo de paco" sur la rivero Niso kvazaŭ substrekus la sencon de tiu ĉi renkontiĝo en atmosfero de la nuntempa strebado por daŭra paco en la tuta Eŭropo.

Okaze de la junulara mondfestivalo en Berlino efektiviĝos tie ĉi 50 -kilometra rondiro trans ses montoj ĉirkaŭ la urbo, kiun aŭspicios la Distrikta Packonsilantaro en Jablonec.

M Ě L N Í K - La Pacdefenda Esp.Grupo, LG de ĈEA (p.schr.25 276 80 Mělník)iĝis ĉefiniciatinto por la kolektado helpe al la postmilita rekonstruado de la lernejoj en Vjetnamio. La kampanjon organizas la loka junpionira organizaĵo.

O L O M O U C - Rememorvesperon omaĝe al la 113-a naskiĝdatreveno de L.L. Zamenhof aranĝis EK ĉe PKO 15.12.72. Pri la vivo kaj verko de Zamenhof parolis s-ro Novotný. La kluba sekretario Blažek raportis pri la ideologia seminario de ĈEA en Měřín.

Jarkunveno de la klubo okazis la 23-an de januaro.

O S T R A V A - LG ĈEA organizis 30.1. enkadre de siaj regulaj programoj diskuton pri la seminario en Měřín,en kiu partoprenis ankaŭ la ĉeestintoj - K o č v a r a, Sova,Heczko,Fremlová,Šebestová. 21.3.prelegis D.Kočvara pri la celoj de la Esp. movado en la socialismaj landoj.

La kongresa preparkomitato kunvenadas nun ĉiumerkrede.

O S T R O V n.Ohří - Al 9membra rondeto revenis ĝia kunfondinto J. Kafka k du malnovaj esperantistoj,s-ino Gajdošová kaj s-ro Barth. Estis elektita nova komitato kun la prezidanto s-ro Souček. Ĉiuj anoj fariĝis abonantoj de PACO kaj de la bulteno "TS informas".Oni komencis per grandskala informado pri la Internacia Lingvo.

P A R D U B I C E - La II-an Esperantan balon okazigis la grupo 24.2.73 ĉe Kulturdomo ROH Dukla. - Amikan renkontiĝon oni planas jam tradicie en Kunětická hora (26.-27.5.)

Š U M P E R K - Pro manko de konvena ejo oni estis devigitaj interrompi la regulajn kunvenojn kaj rezigni pri organizo de kursoj. Sekr.O.Müllerová instruas nuntempe en sia propra loĝejo. Tamen funkcias kursoj en la filioj,nome A-kurso en V.Losiny sub la gvido de E. Sittová kaj B-kurso por gejunuloj en Ruda n.M. (E.Pokorná).

Laste oni akiris provizoran kunvenejon en la restoracio "U radnice",kie okazis ankaŭ jarkunveno kun elekto de la nova komitato.

T E P L I C E - LG ĈEA organizas nuntempe tri kursojn gvid.de Košťál,Svobodová kaj d-ro Rusín. Naskiĝis jam kontakto kun Distrikta Packonsilantaro. En la tutjara laborplano oni preparas i.a. seminarion de la nordbohemiaj es-

<u>HELPILO FACILE HAVEBLA !</u>

ESPERANTO-KURSO POR PROGRESINTOJ, 135 paĝoj,formato A 5,prezo 12 Kčs. Tiun ĉi perradian kurson kompilis la konataj slovakaj aŭtoroj P.Rosa, d-rino M.Šaturová kaj J.Jánošov. En dudek du lecionoj oni trovos abundan konversacian materialon, diversteman prozon kaj ĉefe poezion. La aldonita vortaro mem ampleksas 35 paĝojn. La artikoloj tuŝas precipe geografion kaj vojaĝadon.

Ne forgesu peti la libreton ĉe: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, p.schr.8 120 21,Praha 2.

---

KONTRIBUANTOJ POR STARTO ! Skribu viajn raportojn k.a. en Esperanto !!

perantistoj en Duchcov (majo),kunlaboron kun Distrikta Komitato de Socialisma Junulara Ligo (oktobro), aŭtunan ciklon de prelegoj pri Ukrainio kaj la apudbaltaj sovetiaj respublikoj.

T Ř E B Í Č - LG zorgas pri la nova sengo : ĉe la Domo de pioniroj funkcias nun porinfana E.kurso. Rekonstituiĝis la junulara grupo ; ĝiajn 29 anojn gvidas B. Husák kun la komitatanoj O.Sittauerová k S.Mastný.

La EK-membroj dediĉos 2600 laborhorojn por la rekonstruo de SET Lančov. - Lastatempe okazis vespero omaĝe al la 25-a datreveno de la Venka Februaro (prelegis d-rino K.Bartlová).

Ú S T Í n.L. - Kultura vespero kun variaj literatura kaj muzika programoj, omaĝe al la februara jubileo, okazis ĉi tie la 22.2. 73. Enkondukan vorton pri la jubileo prezentis J.Kořínek, en la muzika parto kontribuis M.Smyčka kaj d-ro V.Novobilský, krome oni prezentis specimenojn el la magnetofonaj programoj de Pedagogia sekcio de ĈEA pri kelkaj elstaraj esperantistoj. Enkadre de la programo estis aranĝita ekspozicieto de ĉiuspecaj esperantaĵoj.

V S E T Í N - Enhavoriĉan laborplanon por 1973 prezentis la kluba estraro ĉe la jarkunveno okazinta 22.1. Inter la ĉeftemoj estas menciindaj daŭra kleriga aktiveco (regulaj program-vesperoj kaj kontaktoj kun alilandaj esperantistoj), eksterkluba aktiveco (oni jam kunlaboras kun Ligo de Socialisma Junularo,ankaŭ kun la distrikta gazeto kaj kun regionaj verkistoj kaj pentristoj). EK daŭre propagandos belecojn de Valaĥio,kiel montras ankaŭ la laste eldonitaj bildkartoj.

Speciale merithava estis la ĝisnuna agado de la Esp.libro-servo,kiu disvendis dum 5 jaroj milojn da Esp.libroj kaj gazetoj (Esperanto,Heroldo,Starto,Esperantisto Slovaka, Paco k.a.)

Fratiĝo kun la slovakaj amikoj estas unu el la ĉefaj aktivecoj de la klubo, kiu interrilatas kun EK Žilina kaj dum kelkaj jaroj ĝi gajnis 20 abonantojn por Esperantisto Slovaka.

Oni elektis novan komitaton kun la prez. Aleš Berka, vicprez.J.Vysloužilová,sekr. M.Polášková, dua sekr.kaj MEM-peranto Č. Bořák,kasisto O.Kovář, bibliotekisto J. Karolík, komitataĥino K.Duřpeková kaj revizoroj J.Mikuš kaj A.Kerlová.

# Kiel antaŭ la kongreso?

Respondas D.BARTOŠÍK,vicprezidanto kaj programestro de EK Praha:

Jam antaŭ unu jaro,laŭ peto de la prepara kongres-komitato, mi ellaboris plurajn grafikajn propagandiloj por la kongreso de ĈEA. Laŭ unu el ili estis presita granda dukolora afiŝo kaj malgrandigite ankaŭ glumarkoj.

En nia klubo (kies anoj kunvenadas nun je la 19a horo lunde en Smečky apud Činoherní klub - rim. de red.) ni daŭre popularigas la 2-an kongreson kaj instigas niajn membrojn amase ĝin partopreni.Mi supozas, ke tiuj,kiuj deziras vojaĝi al Ostrava, jam aliĝis. La Ostravanoj certe meritas subtenon de ĉiuj esperantistoj en nia lando. Tial persona partopreno de ĉiu el ni estas nepre necesa. La publiko konsciiĝu, ke la Esperanto movado en nia respubliko estas vigla kaj ke IL estas vaste uzata por pacaj celoj.

## Samideana kroniko

FORPASO DE L.KRAJÍC. Foriris el niaj vicoj merita esperantisto inĝ.Ladislav Krajíc, eksdirektoro de industria mezlernejo,aĝa 67 j. La enterigo okazis 7.2, en Tábor kun ĉeesto de P.Polnický,sekr. de ĈEA. Adiaŭan paroladon super la tombo prezentis la vicprezidanto de LG JUDr. V. Rajlich. ĈEA dediĉis florkronon kun la teksto : "Al la merita membro de CK - Ĉeĥa Esperanto-Asocio".

Inĝ.Krajíc konatiĝis kun E-o en 1919.Li laboris por IL ankaŭ en Ostrava kaj Č.Budějovice kiel kunlaboranto de la radio en Ostrava (ties E.elsendado),plue kiel vickomitatano de ĈEA kaj prez. de ĝia ekzamena komisiono.

Inĝ.L.Krajíc estas aŭtoro de ĉeĥa lernolibro de E-o kaj tradukinto de "Maŝinfaka vortaro" de Wüster en la ĉeĥan lingvon. Ĝis sia forpaso (31.1.) li ankoraŭ laboris super la teknika terminaro Esperanta-ĉeĥa. La persono de la kara forpasinto restos ĉiam en la memoro de ĉiuj ĉeĥaj esperantistoj. (k)

En Praha forpasis la lan de marto prof. Klement U r b a n, aĝa 92 jarojn.Honoron al la memoro de tiu ĉi merita esperantisto!

(daŭrigo de la 3-a paĝo)
as la ĉefa organizanto de nia Kongreso. Ĝi havas longan tradicion : jam en 1910ekzistis en Vítkovice societoj de esperantistoj,ŝakistoj kaj enigmistoj. Tiu ĉi klubo estas la plej granda en Ostrava. La trian Esp. rondeton havas la fervojistoj en Přívoz. La feruzina gazeto en Vítkovice kaj ankaŭ aliaj lokaj gazetoj publikigadas informojn pri nia movado. La vorto "Esperanto" aperas ĉiumonate sur la afiŝoj de la kulturdomo de ministoj en la tuta urbo, atentigante pri konversacia vespero.Kaj en tiu ĉi kulturdomo de OKD (Ostravsko-karvinské doly) okazos ĉiuj aranĝoj de la kongreso.

En la kvartalo Zábřeh staras la Esperanto-monumento,konstruita tie en 1952, kiel atestanto pri aktiveco de niaj esperantistoj. La surskribo memorigas J.A.Komenion, kiu antaŭ pli ol 300 jaroj argumentis la neceson krei novan lingvon internacian anstataŭ la malnoviĝanta latino. La monumento estis origine starigita jam en 1934 en la proksima Nový Bohumín kun alia surskribo. Dum la nazia okupacio ĝi estis forigita, sed poste retrovita post la j.1952.

Jen,la nigra Ostrava, kun riĉaj kaj variaj historio kaj kultura vivo, kiu bonvenigos vin dum la dua kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La ekskurso konatigos vin kun vidindaĵoj en la ĉirkaŭaĵo kaj ankaŭ kun la bela montaro Beskydy,somerumejo de multaj Ostravanoj.

Venu certe ĉiuj ! Adolf Staňura

---

Do 15.března se přihlásilo na sjezd 230účastníků. Svůj příspěvek,přestože se sjezdu neúčastní,zaslali ing.J.Adamec,A.Bárochová,B.Metznerová,G.Niemczyk,dr.V.Pávek, R.Tomiczek. • V programu sjezdu je zahrnuto také společné fotografování • Pro filatelisty je připravena poštovní přepážka s příležitostným pošt.razítkem • Vaše připomínky k organizaci sjezdu očekává Sjezdový výbor (MS ČES - DK VŽKG, pošt. schr. 55,703 00,Ostrava,3) v tomto složení :

D.Kočvara(předseda), P.Polnický (za sekr.ČES), M.Sova (pokladník),J.Hanzelka a J.Václavík (ubytovací služba), L.Klegová, J.Šebestová (výdej kongresových materiálů), G.Heczko (magnetofonový záznam), L.Němec (fotoslužba),ing.V.Kočvara (kulturní program).

---

SAMIDEANA KRONIKO (daŭrigo)

Forpasis en Praha Emil R y b i n s k i, la iama revuisto de EKP,aĝa 76 jarojn. La enterigo okazis 14.3.

Z.MATYKOVÁ 60JARA. La 12an de marto 73 sesdekjariĝis prezidantino de LG ĈEA en Hradec Králové Zdena M a t y k o v á. Ŝi konatiĝis per sia tradukaktiveco kaj fervora agado sur la kultura kampo. Al la ŝatata jubileantino koran gratulon !

JUBILEO DE J.CÍCHOVÁ. Sian rondan vivjubileon festos la 14.4.Jana C í ch o v á - Hrdličková, anino de la iama ČSEK kaj prez.de ĝia virina komisiono. Kunlaboris al Informoj de ČSEK,Paco k.a. per tradukoj kaj originalaj poemoj kaj prizorgis Esp.elsendadon de la ĉs.radio por Aŭstrio. Ŝi daŭre konigas la ĉeĥan kulturon en diversaj E.gazetoj.

Geedziĝis en Mělník la 2an de marto Jiřina Š v a r c o v á kaj Pavel V r b a. Niajn gratulojn !

---

ESPERANTISTAN RENKONTIĜON

aranĝas en la tagoj la 7-a kaj 8-a de aprilo en Ústí n.L la loka rondeto kunlabore kun ER de Uzina Klubo Bonex en Teplice.

P r o g r a m o :

SABATE la 7.4. je la 12,30 horo renkontiĝo antaŭ la Sindikata Domo en Ústí. Je la 13a horo komuna tagmanĝo,postta gmeze trarigardo de la urbo. Vespere je la 19a artisma programo en la Domo de Kulturo. Kantos kaj aktivos la lokaj artistoj.Post la programo amika kunestado.

DIMANĈE la 8.4 forveturo al Teplice kaj Duchcov kaj vizito de tieaj vidindaĵoj.

A n o n c o j ĝis la 31-a de marto!

---

EL NIA LETERKESTO. "...ni penas disvastigi nian kunlaboron en la kultura informado.Por progresigi ĝin ni intencas organizi kolektivan korespondadon tra la tuta socialisma tendaro.Eldiru vian opinion : L.G.Kapustin,603115-Gorkij,Nevzorovoj 72-7, USSR.

Rudolf HORSKÝ

# NI EN MOSKVO (2)



La vetero estis belega, tial, sen interrompi nian planon, ni ekiris por trarigardi la ekspozicion pri sukcesoj de la nacia soveta ekonomio. Por tiu celo ni uzis metroon, kies stacio situis proksime de nia hotelo.

Same kiel en Leningrado ankaŭ en Moskvo la trajnoj de la metroo veturas tre rapide. Scipovante legi la rusajn literojn oni povas facile orientiĝi. Tial ni atingis la ekspoziciejon sufiĉe frue. Jam en ĝia proksimeco kaptis mian atenton grandega obelisko "La humiligantoj de la universo" konstruita honore al la sovetiaj kosmonaŭtoj.

Laŭ sia areo la ekspozicio estas tre vasta, ĝi ampleksas pli ol 200 hektarojn. Por atente trarigardi ĝin oni bezonus almenaŭ unu semajnon. Ni kapablis pli detale rigardi nur la pavilonon "Kosmos", kiu montras la pioniran lokon de la sovetaj sciencistoj en la astronaŭtiko. Inter la pluaj pavilonoj /ili estas sepdek/ estas prezentitaj sukcesoj de Sovetunio en la fakoj de industrio, agrikulturo, scienco kaj kulturo. Krome troviĝas tie vico da diversaj aliaj aranĝoj kaj la teatro en la naturo. Ĝuste en ĝi okazis koncerto de iu armena trupo.

Post la vespermanĝo nin vizitis en la hotelo la moskvaj esperantistoj, kiuj eksciis pri mia alveturo kaj invitis min partopreni ilian kunvenon. Mi volonte akceptis la inviton, dediĉinte la tutan vesperon al la amika kunesto. Ĝi ne seniluziigis min : en la kunveno estis precipe junaj homoj, ĝuste tiam preparantaj sian someran tendaron.

La sekvantan tagon regis en Moskvo fakte tropika varmego. Laŭ la ekskursa plano oni trarigardis la moskvan armilejon. Tuj poste - dum la aliaj ekskursanoj veturis por tagmanĝo - mi ekiris al la Maŭzoleo de Lenin kaj enviciĝis en la aron da homoj, kiuj staris tie ĉi por kliniĝi al la viro, kiu tiom meritis pri la konstruado de la socialismo. La komuna vizito de la maŭzoleo estis planita nur por la sekvanta tago, sed mi volis gajni liberan antaŭtagmezon por viziti Zagorsk apud Moskvo, kie troviĝas elstaraj arkitekturaĵoj el la 14-a ĝis 18-a jarcentoj. Mi jam sopiris vidi memorindaĵojn de Troico-Sergijevska Lavro, ornamitajn per bildoj de A.Rublev... /fino/

# Recenzoj

Erni K r u s t e n: OKUPACIO, eld. Eesti Raamat, Tallinn 1972. El la estona trad. H. Saha, red. H. Seppik, il. A. Keerend, 13 x 16cm, 90 pĝ.

La novelo, kiu ricevis la jaran premion de la Estona SSR por 1969, apartenas al la plej bonaj lastatempaj verkoj de E. Krusten, merita verkisto de ESSR kaj unu el la plej elstaraj majstroj de la enlanda prozo. La aŭtoro pruvas per sia libro /la temo estas faŝista okupacio de Estonio en 1941-44j./, ke eĉ senlima malhumaneco ne povas malaperigi homajn sentojn kaj pensadon.

Pri ESTONIO rakontas samnoma prospekto eldonita en 1972 de Eesti Raamat, Tallinn, 14 x 21 cm, 32 pĝ. La libreto estas riĉe ilustrita per koloraj bildoj. /k/

Post la sukcesaj lastatempaj eldonaĵoj pliviĝliĝis Esp. eldonado en Sovetunio. Jenaj libroj estas preparataj : ANTOLOGIO DE ESTONA SOVETA POEZIO, sub la redakto de H. Dresen. En 5000 ekz. eldonos ĝin en la tria jarkvarono 1973 la eldonejo Eesti Raamat. Prezo 50 kop. /NK 52-72/236/ o ESTONA SSR, albumo kun tekstoj en la estona, ru-

sa, angla, franca, germana, finna kaj esperanta. Eldonota en 50 mil ekz. en 1973. Prezo 1rub.28 kop./NK 51 -72/330/ o ESPERANTSKO- RUSSKIJ SLOVAR', red. E.A.Bokarev. Sovetskaja Enciklopedija eldonos ĝin en 50 mil ekz. en la 3a kvaronjaro 1973. Prezo 1 rub./NK 52-72/185. Ĉiuj tri eldonaĵoj estas mendeblaj ĉe ĉiu vendejo de Zahraniční literatura /t.e.en ĉiu regiona urbo/, se la mandanto indikos la mendo-numerojn /en krampoj/. /zh/

JUNULARO. Magazino el GDR. Eld. Verlag Zeit im Bild, Dresdeno en 1973, 63 pĝ., 23 x 16 cm. Ĝi alportas interesajn artikolojn okaze de la X-a junulara mondfestivalo en Berlino. Ĉiu leginto eldiru sian opinion pri la enhavo k komuniku ĝin al Centra Laborrondo Esperanto de GDR en Germana Kulturligo, DDR 108 Berlin, Charlottenstr.60.

SKIZOJ PRI LA USONA NOVKOLONIISMO /I/, eld. Fremdlingva eldonejo Hanojo 1972, pĝ.188. Dediĉita al la studado de la mondskalaj metodoj de la usona koloniismo, speciale tiu en Suda Vjetnamio.

LEGU KAJ ABONU "J A V I S K O" !

Antaŭ kvin jaroj aperis en " Umelecké slovo" (nun "Javisko") -monata révuo de la slovakaj amatoraj teatristoj, pupteatristoj kaj deklamistoj - la unuan fojon la Esperanto-paĝo, sur kiu jam aperis preskaŭ du cent originalaj kaj tradukitaj poemoj de 123 en- kaj eksterlandaj aŭtoroj - inter ili 37 poemoj de 15 ĉeĥaj aŭtoroj kaj 11 paĝoj de prozo.

JAVISKO kun sia Esp.paĝo meritas vian atenton kaj subtenon ! Abonu ĝin (pere de PNS aŭ ĉe la redakcio), legu kaj uzu la E.paĝon, kuraĝigu la redakcion (adr. Javisko, ul.Čs.armády 29/a, 801 00 Bratislava 1) per kelkaj vortoj, kiuj valoros oron, ĉar ili helpos la pluan ekziston de la Esp.paĝo. VeGa

TOTO ČÍSLO DOSTÁVAJÍ POUZE ČLENOVÉ, KTEŘÍ ZAPLATILI SVŮJ ČLENSKÝ PŘÍSPĚVEK ZA ROK 1973 !

# Caveant consules!

Antaŭ nelonge mi legis en HEROLDO la artikolon de I.Dratwer pri tio, ke esperantistoj uzas tiom da superfluaj neologismoj, ke ili fariĝas erudiciaj mortigantoj de facila Esperanto. Mi tute konsentas kun li, ĉar post 52-jara laboro poresperanta mi bezonus preskaŭ vortaron de neologismoj por legi la artikolojn kaj leterojn de tiuj "erudiciuloj", en kiuj ĉie svarmas neologismoj.

Ĉu estas necesaj : k u r t i g o j, f e b l a, v o r i, l a n ĉ i, t r i s t a (en ĉiutagaĵoj !) anstataŭ jam bone konataj : m a l l o n g i g o j, m a l f o r t a, m a n ĝ i, k o m e n c i, m a l g a j a ktp?

Ĉu ni ne instruas superflue, ke oni uzu prefikson m a l -, se niaj erudiciuloj klopodas elpensi jam preskaŭ por ĉiu mal-vorto novan apartan vorton? Kie estas la vortfarado ? Kien forflugis la facileco de la lingvo ? Kie estas la genieco de D-ro Zamenhof kaj Grabowski, se G.Waringhien francigas la internacian lingvon (trastudu PIV !), W.Auld kreas eĉ mallongigojn por "tro" longaj verboj (vidu "Paŝoj") kaj la Akademio silentas?

Prof.Th. Cart, la prezidinto de nia Akademio skribis la 20.12.1923 : "... se ni, esperantistoj, dank al nia s e v e r a l i n g v a d i s c i p l i n o ...sciis konservi al nia lingvo ĝian i n t e r n a c i a n u n u e c o n, ĝian v o r t a r a n s i m p l e c o n, ĝian k o m u n a n f a c i l e c o n, nenia forto, nenia kontraŭbato malhelpos triumfon al nia Zamenhofa esperanto !"

Sed bedaŭrinde, kie estas la severa lingva disciplino ?

Caveant consules !

V.Pechoč

# Lingva ekzercisto

Komparu vian tradukon de la ĉeĥaj (esp.) esprimoj el la lasta numero :

gojsona rido (radostný smích), piedfingre postsekvi (krást se po špičkách), elvolbi la bruston (vypnout hruď), flugdelikate malleviĝi (jemně se snést) - brát po osmi schodech (saltpreni po ok ŝtupoj), hodit sebou (svingĵetiĝi), otevřít dokořán (plenlarĝe malfermi), vykoukat si oči (rigardforuzi okulojn), vlídně pokynout (korfavore mansigni), pestrý příběh (scenriĉa epizodo), vpadnout někam (kurenfali).

Kiomfoje vi sukcesis fidele traduki..?

# Planu vian libertempon

ĈU VI VOLAS PASIGI SOMERON INTER LA ESPERANTISTOJ EN ĈEĤOSLOVAKIO?

Atente legu kaj elektu ! Informojn petu ĉe la respektivaj landaj asocioj : AE SSR, pošt.pr. D/10 80100 Bratislava
ĈEA, pošt. schr.8 120 21 Praha 2

| | |
|---|---|
| Renkontiĝo en Poděbrady /29.6.-1.7./ aranĝas | ĈEA |
| Somera E.tendaro en Herbortice /9.-21.7./ | ĈEA |
| Somera lernejo en Dudince /8.-22.7./ | AE SSR |
| Laborseminario en Lančov /8.7.-14.7./ | ĈEA |
| Internacia esperantista renkontiĝo en Jablonec n.N.--Tanvald /13.-15.7./ | ĈEA |
| Somera lernejo en Liptovský Mikuláš /15.-28.7./ | AE SSR |
| SET Lančov, 1-a etapo /15.-28.7./ | ĈEA |
| Kulturturisma semajno en B.Bystrica /21.-28.7./ | AE SSR |
| Renkontiĝo en Tatranská Lesná, hot.Jánošík/27.-29.4/ | AE SSR |
| SET Lančov, 2-a etapo /29.7.-11.8./ | ĈEA |
| Somera lernejo en Opátka /29.7.-11.8./ | AE SSR |
| Somera kolegio en Liberec /1.-14.8./ /kursoj A-E, loĝado en studenta hejmo, prezo 680 Kčs/ | ĈEA |
| Amika renkontiĝo en Dudince /8.-9.9./ | AE SSR |
| Renkontiĝo en Mělník /21.10./ | ĈEA |

ESPERANTISTAJ FERIOJ EKSTERLANDE - La oka internacia esperantista feriado /la Ora Pola Aŭtuno/ okazos inter la 18a sept.kaj la 1-a okt. en la montara ripozejo Miedzygorze. La organizantoj preparis por vi abundan kulturan kaj societan programojn. La partoprenkotizo 1570 zl.
o Ferioj kaj kursoj en la paradiza Rodopi-montaro, Bulgario: Ora Esperanto-feriado /16.-25.9./ kun ekskursoj, kultura programo. Kotizo 50 levoj o Esp. kursoj en Pisanica, Bulgario /1.-14.7, 1.-14.8. kaj 16.-29.7, 8./ por 56 levoj o Restadejo Pamporovo /1.-14.8./ por 70 levoj.

Asocio Monda Turismo, kiu laboras por amasa aplikado de E-o en la internacia turismo, petas ĉiujn turistojn esperantistojn sendi alĝia adreso /P.K.45, Sofia-C, Bulgario/ turismajn prospektojn, afiŝojn en iu ajn lingvo por aranĝo de migranta ekspozicio. La sendintoj rekompence ricevos bulgarajn esperantaĵojn.

---

RENKONTE AL LA 58-a UK. Kiel ĉeftemon de la venonta Universala Kongreso en Beogrado (28.7.-4.8.1973) la estraro de UEA elektis la problemon de LINGVA EGALRAJTECO EN TEORIO KAJ PRAKTIKO". - LKK anoncis aliĝon de 17 eminentaj personoj al la Honora Komitato de la 58-a. Inter ili estas ankaŭ la ĉefministro Džemal Bijedić, la ĉefurbestro de Beogrado Branko Pešič k.a. - Ĝis 31.1. estis entute 695 aliĝintoj el 34 landoj.

## Okénko do sekretariátu

K 31.prosinci 1972 zaplatilo 2416 členů ; další platby za rok 1972 docházejí. Lze tedy konstatovat,že se nám podařilo dosáhnout plánovaného počtu 2500 platících členů.Chtěli bychom však docílit, aby příspěvky byly vyrovnány do konce 1.čtvrtletí běžného roku. K 31.12.jsme vydali již 3109 svazových legitimací, z čehož vyplývá, že počet těch,kteří neobnovili své členství, je značný./Podle došlých zpráv zemřelo od vzniku svazu 50 členů/.

Je třeba zlepšit práci a náplň činnosti místních kroužků a skupin tak, aby počet členů,kteří z našeho hnutí odcházejí,byl minimální. V řadách neplatících se nacházejí i mnozí funkcionáři a aktivisté ! Tím se budou muset svazové orgány zabývat.

Nezbytně nutné je zvýšit počet místních skupin svazu /MS/ ze stávajících kroužků a klubů. Ke konci roku měl svaz 7 MS s právní subjektivitou a 28 MS bez právní subjektivity.

Přehled MS/EK/ podle počtu PLATÍCÍCH ČLENŮ / k 31.12.1972/:

Praha 299, Paskov 127, Brno PKO 110, Mělník 103, Třebíč 101,Ostrava VŽKG 87, Kopřivnice 81, Vsetín 64, Č.Budějovice 52, Č.Třebová 49, Třinec 44, Pardubice 41, Plzeň 40, Šumperk 40, Jablonec n.N.38, Liberec 36, Olomouc 36, Tábor 33, Opava 32, Hradec Králové 30,Poděbrady 30, Stonava 30, Ústí n.L. 29, Žďár n.S. 29, Gottwaldov 28, Kolín 28, Mor. Budějovice 27, Písek 26, Příbram 26, Poruba-Ostrava 25, Polička 24, Bor u Tachova 21, Hranice n.M.21, Prostějov 21, Roudnice n.L.21, Znojmo SZTŠ 21, Bučovice 19, Svitavy 19, Havířov 18, Kyjov 18, Trutnov 18, Teplice v Č. 17, Havl. Brod 16, Příbor 15, Hořice 14,Humpolec 14, K.Vary 14, Miletín 14, Vyškov 14, Brno LB 13, Lanškroun 13, Jihlava ZK 12, Most 12, Přerov 12, Český dub 11, Místek 11, Náchod 11 Č.Lípa 10, Králíky 10, N.Jičín 10, Ostrava ČSD 10, Boskovice 9, Semily 9, Frýdlant n.O. 9, Mělník-H.Počáply 9, Znojmo MOB 9, Hodonín 8, Jaroměř 8, Jihlava DK 8, Městec Kr. 8, Cheb 7, Kladno 7, Litomyšl 6, Ostrov n.O. 6, Žamberk 6, Lichnov 5, Slavkov 5, Turnov 5

DARY NA EDIČNÍ FOND /dokončení seznamu z r.1972/ :

M.Foldová 10.-, Z.Belzová 27.-,A.Mrázová 10.-,EK Králíky 10.- J. Veselý 12.-, E.Dejmalová 27.-,J.Klepoch 15.- a nejmenovaný dárce 150 Kčs. Celkem jsme v r.1972 obdrželi od dárců 1866 Kčs. Všem děkujeme a věříme, že budou mít i letos pochopení pro naši činnost !

PODPORUJÍCÍ ČLENOVÉ SVAZU v roce 1972 /dokončení/:

J.Hamáčková 100.-, ing. M.Hrdličková 130 Kčs. V r.1972 přispělo v této kategorii celkem 31 členů. Všem patří náš dík !

UPOZORNĚNÍ. Vzhledem k tomu, že jsme od maďarského svazu,který je vydavatelem čas.JUNA AMIKO,neobdrželi potřebné informace,nebylo možno stanovit předplatné na tento časopis. Ukázkové číslo můžeme zájemcům zaslat - cena je 4 Kčs.

---

S T A R T O - eldonas ČEA, p.k. 8 120 21 Praha 2. Aperas okfoje jare. Respondeca redaktoro Oldřich K n í ch a l. Red.komitato : ing.E. Felix, J.Mařík, ing. F.Sviták. Abonebla por la asociaj membroj.- Dohlédací pošta Praha 07,sníž.pošt.popl.pov.ŘP Praha j.zn.P/1-2283/71 ze dne 6.5.1971. Toto číslo předáno do tiskárny 19.března 1973.